



LA INFORMILO

----- * * -----
INFORMBULTENO PRI ESPERANTO

BULLETIN BILINGUE D'INFORMATION SUR L'ESPERANTO

ELDONISTO : **esperanto-federacio de ORIENTA FRANCO**

*Editeur: Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto
Maison des Jeunes et de la Culture
27, rue de la République, 54000 NANCY -F-
PCK - CCP: 1997-72 W NANCY*

nouvelle série

trimestriel

1^{er} TRIMESTRE 1977

n° 17



abonnement

un an: 10F

UNU JARO: 10 F

(8 INTERN. KUPON.)

NTO★FLASH.... ESPERANTO★FLASH.... ESPERANTO★FL



en direct des **CONGRES 1977**

Reykjavik★

Le Président de la République, Kristjan ELDJÁRN, sera effectivement présent lors de l'ouverture solennelle du CONGRES UNIVERSEL, le 30 juillet 1977. Des représentants des Congressistes seront par ailleurs reçus dans la résidence présidentielle. Le Comité d'Organisation a déjà enregistré plus de 750 adhésions pour ce Congrès qui sera axé sur le thème "LE DROIT A LA COMMUNICATION".

— * —

Augsburg★ (RFA)

Pour la seconde fois après sept années, la métropole souabe accueillera les espérantophones du Mouvement International des Anationalistes. Nous venons d'apprendre que la jeune troupe du TESPА (théâtre espéranto de Paris) présentera à cette occasion la pièce d'Albert CAMUS, "Les Justes".

— * —

Grenoble★

Au cours de leur Congrès National du 27 au 30 mai, les espérantophones français/participeront à de nombreuses excursions: Vercors, Hautes-Alpes... et même à une marche en montagne.

— * —

Bar-le-Duc★

Réunis en Congrès Fédéral les 23 et 24 avril, les espérantophones de l'Est de la France assisteront à une soirée artistique particulièrement riche: Chants en espéranto par une chorale mixte de 80 exécutants, quart d'heure poétique en hommage au Hongrois KALOCŞAY, prestation du TESPА qui interprétera deux oeuvres originales en espéranto et un essai sur Horace, de Pierre Corneille. Une exposition sur la langue mondiale sera ouverte au public durant la semaine qui précèdera le Congrès.

— * —

Radio-Vatican émet en espéranto *

Chaque dimanche de 21h05 à 21h15 sur la longueur d'onde moyenne de 196m et sur les ondes courtes de 48,47m /41,38m et 31,17m en direction de l'Europe. Inaugurée le 2 janvier 1977, cette émission bénéficie de la collaboration de la Section Romaine de l'Union Catholique Internationale Espérantiste. Au programme: débats d'ordre religieux, interviews, courrier et musique.

LES ACTIVITES ESPERANTO AU LUXEMBOURG *

Centre de Rencontres Internationales par excellence, le LUXEMBOURG accueillera du 14 au 24 juillet la Conférence annuelle des Educateurs pratiquant l'Espéranto (ILEI) sur le thème: "La valeur culturelle de l'Espéranto". Nos lecteurs apprendront avec intérêt que des cours d'espéranto ont actuellement lieu à l'Ecole de l'Europe, cours suivis par 60 enfants. Dans la même ville, l'hôtel HOLIDAY INN est sur le point de diffuser un document publicitaire en 5 langues dont l'espéranto.

LES EDUCATEURS FREINET ET L'ESPERANTO *

Après leur succès de Varsovie -160 Educateurs de 12 pays s'y sont en effet réunis en 1976 et l'espéranto y a été plus utilisé que les autres langues- les participants de la prochaine RIDEF se retrouveront à Lisbonne du 17 au 30 juillet. Leurs travaux s'effectueront en "ateliers auto-gérés" et porteront sur l'étude du milieu et sur les techniques modernes d'éducation. Un forum quotidien fera le point sur les solutions et découvertes nouvelles.

UNE MONTGOLFIERE AU BLASON "Espéranto"!



Avec ses 15 m. de diamètre et ses 1600 m³ de volume, ce ballon gonflé à l'air chaud, financé par la vente de 2000 enveloppes "1er jour", baptisé au champagne à GRÜNINGEN, Suisse, le 18 décembre 1976, en présence de nombreux espérantistes, poursuivra aux beaux jours sa mission informative dans le ciel européen.

Avant la dernière guerre déjà, des avions ont porté par delà les frontières le symbole de l'espéranto.


LES CITOYENS DU MONDE ET L'ESPERANTO *

On se souvient que la carte de "Citoyen du monde", imaginée par Gary Davis il ya quelque 30 ans, fut diffusée en de très nombreuses langues dont l'espéranto bien sûr. Cette année, les Fédéralistes Mondiaux et les Citoyens du Monde se réuniront en Congrès à PARIS au début de juillet

Les organisateurs ont accueilli l'espéranto comme outil interlinguistique éventuel de travail.

RENCONTRE INTERNATIONALE DES JEUNES ESPERANTISTES

Un grand nombre d'enfants des pays européens ayant participé à l'expérience "enseignement simultané de l'espéranto" dans les classes élémentaires, expérience placée sous les auspices de ILEI citée plus haut, se retrouveront au mois de mai à St-GERARD en Belgique. Ces rencontres où des jeunes de diverses nationalités confrontent leurs connaissances en espéranto revêtent toujours un caractère spectaculaire et sont un véritable test sur la valeur irremplaçable de la langue mondiale



★ 36.a KONGRESO DE L'ESPERANTO-FEDERACIO DE ORIENTA FRANCO

→ sabaton la 23an kaj dimanĉon la 24an ←
...de aprilo 1977

kongresejo:

URBDOMO


13, rue Lapique

★ ★ ★

bulletin d'adhésion
dans le dépliant
informatif joint

BAR-LE-DUC

Meuse 55



la loka eĝ-grupo firme kalkulas je via ĉeesto!

Jam de pluraj monatoj klopodas kelkaj grupanoj cele sukceson de nia venonta Federacia kongreso... t.e. unue ke la diversaj aranĝoj glate okazu kaj plaĉu al ĉiuj partoprenantoj kaj due, ke la instancoj, kiuj helpas sindoneme konsciu pri la aŭtentikeco de la fakto Esperanto. Unu argumento elstare valoros: LA NOMBRO DE LA ĈEESTANTOJ.

Ni memoru, ke Jean BERNARD, urbestro, kunsubsignis la leĝproponon rilate eventualan studon de Esperanto en la kadro de la normala oficiala instruado.

Kiam BAR-le-DUC estis proponita -kaj elektita- en Epinal en 1976, tiam ni estis persvaditaj, ke ĉiuj tieaj kongresanoj estis promesintaj kunveni en la ĉefurbo de departemento MEUSE en 1977... Ni laboras por kontentigi ilin:

- Nia kongreso okazos en tute moderne ekipitaj salonoj de LA URBDOMO MEM!
- Ĉambron apud la granda halo oni disponigis al ni por la publika ekspozicio.
- Ni estos OFICIALE akceptataj okaze de "honor-trinkaĵo".
- Ni petis de la TESPA (Teatro Esperanto de PARIZO), ke ĝi prezentu al ni diversajn teatraĵojn.
- Lerneja Kantistaro (80 geanoj!) speciale lernis 3 kantojn en esperanto (inkluzive la universalan himnon!)
- Omaĝe al K. KALOCSEY juna studentino deklamos poemojn kaj tre junaj freŝbakitaj E^o-lernintinoj ludos 3 skeĉojn verkitajn de Stefan MacGill.
- Nia samideano R.HAUPENTHAL, Akademiano, prelegos pri Raymond SCHWARTZ kaj ties verko.
- Cetere gvidataj vizitoj okazos (malnova urbo, muzeo...)
- Ni elektis restoracion, kies etoso -kaj menuoj- estas fame konataj en la urbo... ni tamen ĝuos TRE FAVORAJN prezojn.

Tial ni esperas, ke ne nur la 70 samideanoj de Epinal venos al ni... sed ni plue amike apelacias al niaj samparolantoj el HAUT-RHIN, BAS-RHIN, VOSGES, MOSELLE... por ke ili ĉeestu la 36an FEDERACIAN KONGRESON!

PRAKTIKAJ SCIIGOJ:

A/ Informdokumento (kun ALIĜILO) estas speciale enŝovita en ĉi-tiu n^o de LA INFORMILO. Vi povas laŭdezire peti aliajn al P. DENIS, 5 ch. de Blamecourt, 55000 BAR-le-DUC.

B/ Detalan Programon (kunsidoj, vizitoj, teatro, ktp) vi ektrivos en via propra "dosiero" je via alveno en la urbdomo.

4 C/ Vi plenigu la aliĝilon kaj sendu la kongres-kotizon -10 F- pofamilio, kiel eble plej rapide al la indikata adreso, per bank- aŭ poŝtĉeko. La prezonde la manĝoj vi povas ankaŭ antaŭe sendi aŭ pagi okaze de via alveno. Vi ricevos specialan insignon... kvankam la arta vespero estos larĝe malfermata al simpatiantoj (tute senpage!) en la al ni freŝmalfermita disponigita teatrejo "A.THEURIET".

und nun... EK AL BAR-LE-DUC !!!

OMAGĜE AL JEAN CHAPPELLIER † 1976

La "ĉevalido de la kongresoj" ne plu ekzistas...

Konata esperantisto forlasis nin: Jean CHAPPELLIER, kiu mortis la 26an de decembro 1976 pro koratako. Li estis 69-jara.

Oni alnomis lin la "ĉevalido" pro lia vivpovo kaj lia juneco. Sed tamen li estis rigora je la laboro kaj skrupula je aktivecoj, aktivecoj kiuj plej ĝenerale rilatis al esperanto.

Li partoprenis preskaŭ ĉiujn kongresojn internaciajn, naciajn, regionajn, fervojajn kaj filatelajn. Li estis UEA-delegito kaj fervoja fakdelegito en NANCY dum multaj jaroj. Ĉie li alportis bonhumoron kaj komplezemon. Pro tiu sindono li ricevis rekompenson: Akademias Palmoj.

Bedaŭrinde, de post kelkaj jaroj li ne plu estis "ĉevalido" kiel en la pasinta tempo. Li suferis pro reŭmatismoj kiuj ek-atakis lin dum la milito. La lastan jaron li retiriĝis ĉe sia filo Michel en MOULIN-lès-METZ kaj poste en VIGY. Al tiu-ĉi kaj al lia familio ni kondolencas tutkore.

Blanche kaj Pierre FONDRILLON

Al tiuj linioj, verkitaj de geamikoj, kiuj konis S-ron CHAPPELLIER de lia junaĝo, mi volus tamen aldoni ion, kio pli koncerne nian Federacion.

Dum jaroj li estis la animo de nia Federacio, li estis samtempe kasisto kaj sekretario. La Informilo, dum la jaroj "50", estis presita de S-r° FONDRILLON, kaj S-r° CHAPPELLIER dissendis ĝin. Post la morto de la tiama prezidanto, la Federacio preskaŭ malaperis, ne plu ekzistis komitato, neniu plu volis esti prezidanto. Tiam, ĉiam sindona, ĉiam afabla, ĉiam komplezema, S-r° CHAPPELLIER daŭre laboris, enkasigis kotizojn, malhelpis la morton de la Federacio.

Kiam sub prezidanteco de S-r° BOYET, kaj poste de S-r° CUENE, ni reorganizis la Federacion post 1959, S-r° CHAPPELLIER restis nia kasisto. Car la Informilo ne plu povis esti presita, li mem tajpis la stencilojn, multobligis kaj dissendis. Li ĉiam aktivis, plej ofte tre diskrete, spite al malbona sanstato. Li restis kasisto ĝis la lasta limo, en 1974. Sed ĝis la pasinta somero, li tamen ankoraŭ helpis: li gvidis perkorespondajn lernantojn. Tiam serio da koratakoj ne plu lasis esperon al ni. Kaj ĉiuj, kiuj konis lin, nun funebras.

Jean-Paul COLNOT

ĈEESTU ARANĜOJN ĈE NIAJ NAJBAROJ!

9-a KULTURA SEMAJNFINO EN SARLANDO.

La kutima printempa semajnfino en Sarlando okazos de la 6-a ĝis 8-a de majo 1977, en kastelo Junkerwald, en Blieskastel-Niederwörzbach.

Okazos kurso A (komencantoj), kurso B (gvidos R.DEGRELLE) kaj kurso C (preleg-serio de William AULD pri originala literaturo). Okazos krome di-servo, vin-gustumo, ktp...

Por ricevi detalan programon skribu al:

SEL - Franz-Schubert-Str. 26 D 6602 DUDWEILER

SOMERA FESTO KUN INTERNACIA RALIO KAJ LINGVAJ EKZERCOJ en D 6471 RAMBERG/PFALZ

Detala programo ricevebla ĉe la supra adreso de SEL.

RENOVIGO DE LA KOMITATO DE LA ORIENT-FRANCA FEDERACIO

La mandato de la 4 jenaj komitatanoj finiĝas: S-roj BERGEROT, DENIS, LIENHARDT kaj VOLTZ. Ili bonvolu anonci, ĉu ili kandidatiĝos denove aŭ ne, ĉu pere de la aliĝilo al la kongreso, ĉu rekte al la prezidanto, prefere antaŭ la kongres-tago. Cetere, pro la forpaso de S-r° CHAPPELLIER, kies mandato estus finiĝonta en 1978, mankas plia komitatano.

R. DEGRELLE

... en kelkaj linioj KONATIĜU KUN BAR-le-DUC

Bar-le-Duc kuŝas precize en la mezo de rekta linio PARIS-STRASBOURG, en la vaŝeto de Ornain kaj de la kanalo MARNE au RHIN.

Facile atingebla el ĉiuj direktoj...

-NANCY BAR pere de RN 4, bela ŝoseo sed iom trafik-ŝarĝita. Alia vojo: MARBACHE, St-MIHIEL... pli poezia!

-Freŝbakita Aŭto-vojeĝo "A 4"... FRANKFURT-METZ-PARIS tute proksime (elirejo apud VERDUN, en "Les Souhesmes")

-Vogezanoj kaj Sud-Elzacanoj... pli-longigu iomete sian veturadon tra NANCY (la vojo EPINAL, NEUFCHATEAU, LIGNY estas kurvo-abundega!)

La 22 000 enloĝantoj fieras interalie pri siaj malnova urbo, tutnovaj kvartaloj, muzeo, olimpia naĝejo, muzeo kaj pri la senkernigitaj ribo-konfitaĵoj!

ADRESO DE LA KONGRESEJO:

Urbodomo de BAR-le-DUC
12 rue Lapique (urbo-centro)

2-a etaĝo

Ĉiuj pliaj sciigoj pri la kongreso:

P. DENIS 5 chemin de blamecourt

55000 BAR-le-DUC tĉl. (28) 79 01 44




LA
MALNOVA
URBO
DE L' DUKOJ
bonvenigas
vin!

supplément à "la Informilo" n° 17

23^{an} kaj 24^{an}
de aprilo 1977

36^a kongreso
de la Esperanto-Federacio
de Orienta Francio



BAR le DUC
ĉefurbo
de la
departemento
MEUSE

kongreskunsidoj *
*allogaj vizitoj

ekspozicio *
*akcepto en la urbdomo
*arta vespero



programo

SABATON, la 23an de aprilo 1977

ek de la 12a: alveno de la gekongresanoj - rendevuo en la urbdomo, 13 rue Lapique, sidejo de la kongreso. (antaŭa alveno estas ebla; oni sciigu S-r^on DENIS)

ek de la 15a: *ĉu A/ gvidata vizito de la urbo*

B/ komentata vizito de unu parto de la muzeo

C/ ekzamenoj eventuale

je la 17a: prelego de R. HAUPENTHAL, Akademiano, pri "La verkaro de Rd Schwartz kaj ĝia kontribuo al la Esperanta Kulturo"

je la 19a: komuna vespermanĝo en restoracio "LA TOUR"... tre bongusta menuo en intima kadro!

je la 21a: elstara arta vespero kun kontribuo de la TESPA (Teatro Esperanto de PARIZO), de esperantista kantistaro (80 "artistoj!!"), poezideklamado omaĝe al K. KALOCSAY...

DIMANĈON, la 24an de aprilo


je la 9a: ĝenerala kunsido

je la 11a 1/2: akcepto en la urbdomo-salono, pres-konferenco

je la 12a 1/2: komuna tagmanĝo en LA TOUR (vidu supre!)

je la 14a 1/2: kunsido de la komitato libera tempo por la ceteruloj; vizito de urba ekspozicio, de la libro-stando ...disiĝo... ĜIS REVIDO EN...?

- 1 kongresejo (URBDOMO)
 - 2 stacidomo
 - 3 restoracio "LA TOUR"
 - 4 teatrejo "A. THEURIET"
- * hoteloj



→ Ĉiujnĉekojnvi redaktu jene:
GROUPE DES ESPERANTISTES MEUSIENS
CCP 27 32 V NANCY

(28) 79 11 48

P. Polmard - 13, rue de
piltiteuil - F 55000 Bar-le-Duc



ALIĜILO



BULLETIN D'ADHESION

federacia kongreso - BAR le DUC

(unu aliĝilo po familio laŭeble resendota antaŭ la 31a de marto 1977!...)

NOMO kaj Antaŭnomo _____

ADRESO _____

Ankaŭ aliĝas el la familio: _____

do entute _____ personoj.

BONVOLU REZERVI:

--- unu-lita(j)n ĉambro(j)n (1 person.)

--- unu-grand-lita(j)n ĉambro(j)n (2 p.)

--- du-lita(j)n ĉambro(j)n

--- lito(j)n en amasrestejo (Collège) 5F.

--- vespermanĝo(j)n (la 23a de aprilo)

--- tagmanĝo(j)n (la 24a de aprilo)

Mi kandidatiĝas je komitat-posteno

Mi deziras trapasi ekzamenon (sabaton post-tagmeze):

atesto pri lernado

— praktika lernad.

— kapableco

* aliĝkotizo (tuj pagenda) 10F po fam.

* restoracio: 25F vesp. 30F tagmeze
(tre bongustaj menuoj!!)

* hoteloj: ĉiuj ĉirkaŭ 25F po ĉambro

aliĝilon kaj ĉekon vi bonvolu sendi al...

AGADRAPORTO POR LA JARO 1975 - 1976

Ĉu ĉi-jare la Federacio bone laboris, progresis, antaŭenirigis la Internacian lingvon? Estas respondeble per JES kaj per NE, dependas de la flanko rigardita...

Unue ĝi plu vivis kaj por iu ajn estaĵo estas tamen la ĉefa afero. Ĝian vivon rimarkigas la starigo de la 35-a Federacia Kongreso, la okazigo de tri pliaj staĝoj de parolata Esperanto, la naskiĝo de du novaj parolaj kursoj (nome unua- kaj duagrada), trapasado de ekzamenoj, eniro en la Nancian Fakultaton pri Sciencoj, akcepto de eksterlandanoj, partopreno al ekster-federaciaj aranĝoj...

Due koncerne la perkorespondan kurson kaj la grupan vivon, estis nur viveto. Pri la nombro de la Federacianoj: GRAVA MALALTIĜO! Tamen la staĝoj efikis, ĉar ili permesis pli bonan konon de la lingvo kaj sekve plian kuraĝon por paroli pri ĝi kaj instrui ĝin. Do ne tre bona sed ne malbona!

Ni detale vidu:

La 35a Kongreso en EPINAL kunvenigis 70 samideanojn, kreis novan komision por la geknaboj kaj planis la du sekvajn kongresojn.

La staĝoj por parolata Esperanto arigis entute ĉirkaŭ 140 personoj, ĉe 45 okaze de la dua, 47 por la tria kaj sama nombro okaze de la kvara! Sufiĉa sukceso ĉu ne?

Ĝojiga novaĵo estas la starigo de duagrada parola kurso en TOUL kaj esperiga sciigo: la komenco de unuagrada en LA BRESSE... sen forgesi plezurigan informon: triagrada kurso en BAR-le-DUC.

Okazis trapaso de ekzamenoj kun ĉiufoje sukcesoj: 3 atestoj pri lernado, 4 atestoj pri praktika lernado, 1 atesto pri kapableco kaj 1 atesto pri Pedagogio. Okaze de la decembra staĝo okazis aliaj ekzamenoj sed ĝis nun ne atingis nin la rezultatoj, sendube ankoraŭ ĉi-foje bonegaj.

Ankoraŭ bonega kaj esperiga novaĵo estas, ĉar Esperanto eniris la Nancian Fakultaton pri Sciencoj rilate la "Aŭtomatan Prilaboradon de tekstoj en la Internacia Lingvo sub Speciala Konsidero de la aŭtomata Lingvo-traduko" Temas do pri tezo pri aŭtomata lingvo-traduko per Esperanto. Povos esti granda sukceso. Ni laboru kaj esperu...ĉiam!

Pluraj eksterlandanoj estis akceptitaj nome el Nord-Ameriko, Ĉekoslovakio, Hungario, Pollando, Germanio, eĉ prelego de Stefan MacGill el Nov-Zelando okazis sukcese en BAR-le-DUC. Kelkaj el niaj federacianoj partoprenis en aranĝoj de aliaj Federacioj aŭ Grupoj. Oni scias pri Sarlando, Pollando, Nacia Franca Kongreso. Ĉu aliaj?

Sed ni ne fermu niajn okulojn kaj ni rigardu la ombrajn flankojn. Ili estas tri. La perkoresponda kurso funkcias malpli bone ol dum la aliaj jaroj. La grupa vivo, krom BAR-le-DUC, St-DIE, STRASBOURG kie deĵoras nova delegitino, vegetas, se ne diri, ne plu ekzistas. La nombro de la Federacianoj malaltiĝis el 110 ĝis 87. Temas do pri veraj nigraj punktoj kaj pri ili oni devas paroli kaj sekve preni decidojn. Ĉar sen multaj anoj ne estas multa mono kaj multa agado. Ĉu niaj federacianoj estas forgesemaj por pagi sian kotizon? Ĉu la kotizoj estas tro altaj? Ĉu nunaj Esperanatoj ne ŝatas la "neŭtralan movadon"? Ĉu ili pli amas la neneŭtralajn organizaĵojn aŭ tutsimple la izolecon?

Grava afero nepre priparolenda.

Tamen ni ne estu tro pesimistaj. Eble nia Federacio nun (sed ne por ĉiam) ne progresas, eĉ regresas, sed Esperanto antaŭeniras en pluraj lokoj. Ĉu nova sango? Ĉu novaj fortaj? Kelkaj branĉoj mortis, la trunko fiere staras, jam novaj branĉoj kreskas kaj baldaŭ multaj aliaj.

La sekretario: Roger DEGRELLE

Por rapidigi la protokol-laborojn dum la kongreskunsido, La partoprenontoj bonvolu ne forgesi la presitan "voĉdonilon", eltranĉebla el "FRANCA ESPERANTISTO". Dankon!

5^a staĝo de parolata esperanto

5^{ème} STAGE DE L'ESPÉRANTO PARLÉ

→ 25^{an} kaj 26^{an} de junio 1977 ←
 → en NANCY, Junuldomo Philippe Desforges (MJC) 27 rue de ←
 la République

Montriĝas pli kaj pli necese, por ĉiuj esperantistoj aŭ lernantoj en Orienta Francio, plej parte izolitaj en sia urbo aŭ vilaĝo, kaj ofte lernintaj Esperanton nur perkoresponde, renkontiĝi okaze de semajnfinaj staĝoj. Dum tiuj staĝoj, dank' al rektmetodaj lernolibroj diversgradaj, ĉiuj havas la eblecon paroli en esperanto. La franclingvaj gramatikak klarigoj estas minimumaj en la kursoj A1 kaj A2, preskaŭ ne ekzistas en la kurso B kaj tute ne en la kurso C.

Ni invitas samtempe ĉiujn esperantistojn (eĉ komencantojn) en najbaraj regionoj en Francio, Germanio, Belgio kaj Luksemburgio veni por praktiki kune la vivantan internacian lingvon.

ESTOS 4 KURSOJ:

- KURSO A-1 → por tuj komencontoj
- KURSO A-2 → por ĵus komencintoj, kiuj atingis la duonon de la unuagrada kurso
- KURSO B → por tiuj, kiuj finlernis la unuagradan kurson: ili povos simple babiladi inter si helpe de la libro "POR LA PRAKTIKANTOJ"
- KURSO C → dank' al la libro "Paŝoj al plena posedo", la lingvoposedantoj fajne konfirmos kaj rigore kontrolos sian lingvoposedon.

programo

SABATON, 25^{an} de junio: bonvolu alveni antaŭ la 14a30, por ke la kursoj povu komenci akurate je la 15a. Jen la labor-ritmo: kurso (45 minut.), ripozo (15 min.) ĝis la 19a30. Tiam okazos la komuna vespermanĝo, kaj vespere ni trapasos kune kun amikan vesperon.

ATENTU! Ĉiuj partoprenantoj, kiuj normale reforveturos dimanĉe post-tagmeze, devos liberigi la ĉambrojn kaj redoni la ŝlosilojn inter la 8a kaj 9a matene.

DIMANĈON, 26^{an} de junio manĝo ĝis la 8a horo
 ni parolos de la 9a ĝis la 12a30 (samritme kiel sabate)
 tagmanĝo je la 12a30
 ni parolos de la 14a ĝis la 15a kaj poste... eventuale
 laŭ la vetero kaj laŭ la prefero de la partoprenantoj: vizito al malnova kvartalo en NANCY aŭ vizito al la zoologia muzeo kaj moderna akvario

Eblas trapasi ekzamenon (aŭ -ojn) nome: *atesto pri lernado*
 " *praktika lernado*
 " *kapableco*

Ankaŭ eblas restadi en NANCY antaŭ kaj post la staĝo, sed bonvolu precizigi tion!

La nombro de la litoj estas limigita je 50.

KOSTOJ: Aliĝkoto 6 F po familio

Manĝo (tagmeza 10 F
 aŭ vespera)

Tranoktado kaj matenmanĝo (por unu persono)

- en unulita ĉambro 20 F (rezervitaj por la unuaj aliĝontoj)
- en du-lita 17 F
- en 3- 4-lita 15 F

(Priatentu! Tiuj prezoj validas fine de FEBRUARO. Ili povos iom plialtiĝi)

JUNIA STAGŌ

aligilo

JUNIA STAGŌ

Bonvolu detranĉi aŭ rekopii kaj sendi kun antaŭpago de 20F por ĉiu persono kiel eble plej frue kaj antaŭ la 10a de junio 1977 al

S-r° R. DEGRELLE, 11 Cours Leopold
F - 54042 NANCY CEDEX
pĉk 714 - 95 P NANCY

(bonvolu krucumi laŭdezire
en la eta kvadrato)

S-r° S-in° F-in° nombro de personoj

Nomo: antaŭnomo: Adreso:

Nomo kaj antaŭnomo de eventuale akompanantaj personoj:

Tago kaj horo de alveno: de foriro:

Mi rezervas ____ lito(j)n en ĉambro(j) kun ____ lito(j) sabate vespere

Suplementaj noktoj (eventuale):

Mi rezervas manĝo(j)n sabate vespere por ____ personoj, dimanĉe tagmeze por ____ personoj

Aliaj manĝoj (eventuale)

Mi partoprenos en kurso A1 - A2 - B - C -

Mi mendas la jenajn verkojn: Kursoj A1, A2, Infanoj: "JUNULKURSO" 15 F
"SUPLEMENTO" 3 F
"KASETO" 30 F "DISKOSERIO" 20 F

Kurso B: "Por la Praktikantoj" 12 F - Kurso C: "Paŝoj al plena posedo" 20F

Por ĉiuj (eventuale, laŭdezire) Lexique Fondamental E°-Fr.: 11 F Dict. Prat.: 28 F

Amuzaj Dialogoj: 11 F - Gd Diction. E° / Fr.: 50 F -

Mi deziras trapasi ekzamenon: Atesto pri lern. - pri praktika lern. - pri kapabl. -

Bonvolu eventuale antaŭmendi la kurslibrojn, kiujn vi bezonas kaj ne posedas. Ili estos je via dispono en NANCY, la 25an de junio. (por sendo per poŝto aldonu 25% per "malrapida" kaj 40% per "rapida" sistemo)

FINANCA RAPORTO PRI LA JARO 1976

ENSPEZOJ

79 kotizoj 1976	5531
5 kotizoj el GEE	18
1 kotizo al JEFO	2
Donacoj (laŭ listo)	626,20
Abonoj al E°-revuoj	259,50
Vendo de libroj, propagandiloj	353,60
Aliĝoj al kongreso en Epinal	200
Rentumo de nia ŝparkonto	86,47
	<u>7076,77</u>

BILANCO

enspezoj:	7076,77
elspezoj:	6591,50
profito:	485,27

ELDONADO DE "LA INFORMILO"

Enspezoj:	
128 abonoj por 1976	925

ELSPEZOJ

Kotizoj al UFE	5073
Kotizoj al GEE	81
Kotizo al JFEO	33
Afranko k Sekretariaĵoj	319,20
Propagando	56,40
Perado de abonoj	259,50
Aĉeto de libroj, propagandil.	320,40
Kongreso-kosto en Epinal	449
	<u>6591,50</u>

Elspezoj:

Multoblig. "INF." 13 (400 ekz.)	214
14 (280)	163,60
15 (300)	204
16 (280)	162



d'après Morris

BILANCO

elspezoj	1238,10	Send-kostoj por "INF."	13	131,80
enspezoj	-925		14	121,85
malprofito	313,10		15	119,50
			16	121,35
				<u>1238,10</u>

REZULTO

en la kaso je la 31-12-1975	1093,50	
profito por 1976	485,27	la kasisto: A.GROSSMANN
malprofito INFORMILO	- 313,10	
en la kaso je la 31-12-1976	1265,67	←

NIAJ DONACINTOJ

S-r° BERGEROT 200F - S-r° ALIZON 7F - F-in° MOUREAUX 17,20F - S-in° LOUTERBACH 3F
 S-r° OFFROY 7F - S-r° FRANCOIS 5F - S-r° PANO 7F - S-r° GERARD 4F - S-r° CUENE 13F
 S-in° MEYER 3F - S-r° KOBELT 13F - S-r° REMY 3F - S-r° KLOTZ 13F - F-in° JACQUOT 2F
 S-r° MARTIN 13F - S-r° JUNIER 3F - S-r° RADAM 10F - S-r° BERGEROT 233F - S-r° DURAND
 3F - S-r° THIERRY 3F - anonima donaco 50F - F-in° BILSTEIN 3F - S-in° JUNG 10F -
 S-in° BAUMER 3F -

entute estas 626,20F . Ni sincere dankas al ĉiuj donacintoj dank' al kiuj, nia financa situacio estas relative sana. ———

avant de ranger "la Informilo", envoyez votre adhésion pour le Congrès de Bar-le-Duc!

HAVIGU AL VIAJ INFANOJ LA "TO-TRIKOTOJ"n kun surskribo "62a U.K. de Esperanto - Rejkjaviko ISLANDO 77"

Koloroj: blanka aŭ flava. Impreso reliefa verda.

Jen artiklo per kiu vi povos plezurigi viajn infanojn kaj junajn konatulojn!

Dimensioj: 0/1 = 36-40
2/3 = 42-46 (pli grandaj: elĉerpitaj)

Prezoj: 1 ekzemplero afrankite 35F
2 65F
3 90F
4 110F
10 (nur por la grupoj) 220F

Mendu al: INTERNACIA POŜTISTA ESPERANTO-ASOCIO, franca sekcio,

BP 126 - 05000 GAP CEDEX

poŝt-ĉek-konto: LYON 6052-52

Se pozitiva bilanco antaŭ la fino de februaro, estas planita nova eldono:

"63a U.K. de Esperanto - VARNA BULGARIO 78"

J.P. COLNOT

★ ★ ★

NI GRATULAS!...

... al ĉiuj, kiuj jam pagis sian kotizon por 1977; ili trovos en ĉi-tiu n^o sian membro-karton, (markfolion !) kaj la UFE-kuponon por 1977.

La novaj membroj ricevos ĉion-ĉi kune kun la membro-kartoj de UFE kaj de UEA per aparta sendo.

Se vi ne jam pagis vian kotizon aŭ vian abonon vi trovos en ĉi-tiu bulteno novan kotiz-tabelon kaj memorigilon, per kio vi povos informi nian kasiston pri via kotizo. Jam ne prokrastu vian decidon kaj urĝe pagu vian kotizon. Ni memorigas al vi, ke ĉi-tiu numero de "LA INFORMILO" estas la lasta sendita al vi, se vi ne pagas vian kotizon aŭ vian abonon.

PRI LA KOTIZOJ

En la kotiz-tabelo vi trovis novan kotizon, nome: "MEMBRE AMI DE L'ESPERANTO" minimume 17F + 10F. Ni deziras atentigi vin, ke ĉi-tiu kotizo estas destinata al la neesper tistoj, kiuj favoras al nia lingvo kaj deziras iel subteni ĝin. Ili ricevos specialan karton de membro de UFE (roz-koloran) en franca lingvo. Kiam vi varbos tiajn membrojn, pagante la koncernan kotizon vi bonvolu indiki, ke temas pri ne-esperantistoj plene menciante "Membre Ami de l'Esperanto".

Ni deziras al vi sukceson en via varbado.

A. GROSSMANN

STATUT-ŜANĜO

★ ★

De 2 aŭ 3 jaroj montriĝas necesaj diversaj adaptoj kaj ŝanĝoj en la statuto de nia Federacio. Tiu ŝanĝoj celas plibonigi la tekston de la statuto, provi faciligi la ricevon de subvencio de departementaj instancoj kaj, ĉefe, ebligi revenon al nia Federacio de ekzistintaj membroj kaj transformi simplajn abonantojn al respondecaj kaj voĉdonpovaj membroj.

La novaj tekstoj proponitaj aperas kiel suplemento al LA INFORMILO n^o 17 kaj estos senditaj nur al la membroj de la Federacio kaj al kelkaj aliaj inter esataj personoj. Ĉiuj membroj dezirantaj interveni en la diskutado pri la statuto en BAR-le-DUC bonvolu informi min. Mi atendas perleterajn sugestojn aŭ rimarkojn pri la proponitaj ŝanĝoj, ĉefe el la personoj kiuj ne povos partopreni la kongreson.


la prezidanto JP COLNOT



distra angulo



KRUCVORT-ENIGMO ★



HORIZONTALA.

1-parolinstigi. - 2-ekzercita muzika verko - por skribi. - 3-suda vento ĉe la Helenoj. - 4-lando (sen finaĵo) - denove. 5-politika reĝimo (sen fin.)
 6-kisi perdinte la kapon - prefikso (inverse)
 7-ŝipplatformo (sen fin.) - speco de lupoj.
 8-kongolanda remaĉulo - trinkaĵo (sen fin.)
 9-konjugacia sufikso. - 10-dolorkvietiga.

VERTIKALE.

1-falitaĵo el la ĉielo. - 2-mondonaco (fonetike)-brunkolora. - 3-rilata al komunumregado. - 4-parfumas - sufikso. - 5-ĵurligita oficisto (sen fin.)

6-pronoma - malpuraĵo. - 7-verba finaĵo. - 8-grandegaj - pronoma. - 9-soldat-taĉmento (sen finaĵo). - 10-rilate al skarabo.

SILAB-ENIGMO ★

— Pere de la ĉi-subaj alfabeto ordigitaj "silaboj", vi plenigu la kolonojn laŭ la donitaj difinoj dekstre. La 1a kaj 3a kolonoj eldonas proverbon se vi legos ilin vertikale.

amo ap at ero et ge ia im ir iso jlo ka ko ne ni no nu nto o re sa sio so to u

1 + - + -	malpuraĵo
2 + - + - -	kolora membrano
3 + - +	komenco de kolekto
4 + - + - -	ne multe
5 + - + - -	kemiaĵo
6 + - + - - - -	provizora regnestro
7 + - + - -	religia suvereno
8 + - + - -	ofte superpaŝata
9 + - + -	granda herbo
10 + - + - - -	nesentema, indiferenta
11 + - + - -	kunsida periodo de asembleo

SOLVO DE LA LASTA SILAB-ENIGMO ★

letero - ibiso - neopreno - giroskopo - verniso - anodo - jeto - ruoj

La titolo de la Zamenhof-verko estas: "LINGVAJ RESPONDOJ".

Sin^o LENDER solvis korekte kaj gajnis la libreton de RIBOT "Ni parolu en E^o".
 Gratulon!

Texte actuel

Nouveaux textes proposés

Dans les articles 1-7-8-12-13 les termes "groupes ou centres culturels locaux" sont remplacés par "sociétés locales".

Article 1- 2^e alinéa : Par les mots : "Région de l'Est" on entend ici les départements suivants : Bas-Rhin, Haut-Rhin, Meurthe-et-Moselle, Meuse, Moselle et Vosges.

Chacun de ces départements s'efforcera de constituer une Fédération Départementale (section de la Fédération Régionale) dès qu'il en aura la possibilité (1)

Article 2 - La fédération est fondée pour une durée illimitée. Son siège est actuellement à Nancy.

La fédération est fondée pour une durée illimitée. Elle est déclarée et régie par la loi de 1901. Son siège social est actuellement à Nancy, ou à toute autre adresse désignée par l'Assemblée Générale (2)

Article 3 - La fédération adhère à l'Union Française pour l'Espéranto.

La fédération, en tant que telle, adhère à l'Union Française pour l'Espéranto (UFE) et par elle à l'Association Universelle d'Espéranto (UEA). Elle souhaite que tous ses membres adhèrent également à ces deux Associations (3)

Article 5 - Les moyens d'action de la fédération sont notamment : la publication d'imprimés, périodiques ou non, l'organisation de manifestations culturelles, conférences, cours, examens, concours, fêtes, congrès, la communication de tous renseignements concernant la langue internationale, la participation aux manifestations d'ordre commercial, etc... Si la fédération publie un organe, les associations fédérées peuvent utiliser ce dernier pour leurs communications dans les conditions déterminées par le comité fédéral.

Les moyens d'action de la fédération sont notamment: la publication d'imprimés, périodiques ou non, l'organisation de manifestations culturelles, conférences, cours, examens, concours, fêtes, congrès, la communication de tous renseignements concernant la langue internationale, la participation à des manifestations publiques d'ordre commercial, telles que foires, expositions, etc...(le reste sans changement) (2)

Article 6 - La fédération comprend :

- A) - des groupes et des centres culturels locaux utilisant la langue internationale.
- B) - des membres isolés, dans les conditions précisées à l'article 7 ci-après.

Les différentes catégories de membres sont celles de l'Union Française pour l'Espéranto : membres bienfaiteurs, donateurs, titulaires, juniors, adhérents, étudiants.

La fédération comprend :

- A/- des membres des sociétés locales utilisant la langue internationale
- B/- des membres des associations spécialisées sur le plan local utilisant cette langue pour des buts particuliers.
- C/- des membres isolés dans les conditions précisées à l'art. 7 ci-après.

Les différentes catégories de membres sont, d'une part les membres adhérant uniquement à la Fédération, d'autre part, les différentes catégories de l'Union Française pour l'Espéranto :

- a)- membres actifs comprenant les membres bienfaiteurs, donateurs, titulaires et juniors de plus de 18 ans.
- b)- membres juniors de moins de 18 ans, sympathisants, amis de l'espéranto. (3)

Article 8 - L'entrée dans la fédération résulte de l'adhésion aux présents statuts, après acceptation par le comité fédéral et ratification par l'assemblée générale.

La qualité de membre fédéré (groupe, centre ou membre isolé) se perd par simple déclaration. Elle peut être retirée par le comité fédéral pour manquement aux statuts, l'intéressé ayant été préalablement admis à présenter ses explications, sauf recours à l'assemblée générale.

L'entrée dans la fédération résulte de l'adhésion aux présents statuts, après acceptation par le comité fédéral et ratification par l'Assemblée Générale. Les Associations fédérées conservent leur entière indépendance.

La qualité de membre fédéré (société locale, association spécialisée ou membre isolé) se perd par simple déclaration. Elle peut être retirée par le Comité Fédéral pour manquement aux statuts, l'intéressé ayant été préalablement admis à présenter ses explications, sauf recours à l'Assemblée Générale(2)

Article 9 - Cotisations annuelles à payer :

A) - Pour chaque membre n'appartenant pas, par ailleurs, à l'Union Française pour l'Espéranto, qu'il s'agisse d'un membre appartenant à un groupe, ou un centre culturel, la cotisation à la fédération est au moins égale à celle fixée en application de l'art.4 du règlement intérieur de l'Union Française pour l'Espéranto et compte tenu de la catégorie choisie parmi celles qui sont énumérées à l'art.6 des présents statuts. L'assemblée générale nationale fixe chaque année les cotisations de ces catégories. Tous ces membres reçoivent les publications de l'Union Française pour l'Espéranto correspondant à leur cotisation.

B) - Pour les membres appartenant déjà à l'Union Française pour l'Espéranto par suite d'une adhésion à une association spécialisée déjà membre de l'Union, la cotisation est égale à la différence entre la cotisation payée par les membres individuels à l'association nationale (U.F.E.) et la cotisation réclamée par l'association nationale (U.F.E.) aux fédérations qui lui sont rattachées et dont le montant est défini à l'article 3 des statuts de l'Union Française pour l'Espéranto (U.F.E.).

Cotisations annuelles à payer :

- A)- Pour les membres adhérant uniquement à la Fédération, la cotisation fédérale de référence est au moins égale à la quote-part fédérale pour les membres "titulaires" de l'U.F.E.
- B)- Pour les membres adhérant à l'Union Française pour l'Espéranto :
 - 1/- par l'intermédiaire d'une association spécialisée, la cotisation fédérale est égale à la quote-part fédérale des membres de l'U.F.E.
 - 2/- par l'intermédiaire de la Fédération, les cotisations doivent correspondre aux catégories de membres de l'UFE énumérées à l'article 6 des présents statuts. Ces cotisations sont fixées chaque année conformément aux articles 3 des statuts et 4 du règlement intérieur de UFE, par l'Assemblée Générale nationale.
- C)- Le bulletin d'information édité par la Fédération n'est compris dans aucune des cotisations ci-dessus. Le montant de son abonnement est fixé chaque année par l'Assemblée Générale de la Fédération et il est indépendant de toute cotisation. (3) (4)

Article 10 -1er alinéa- La fédération est dirigée par un comité fédéral de 12 membres majeurs et de nationalité française qui comprendra des représentants des différents groupes ou centres proportionnellement à l'importance de ces groupements. Des membres isolés peuvent également présenter leur candidature.

La Fédération est dirigée par un Comité Fédéral de 9 à 15 membres, majeurs, émanant aussi bien des membres désignés à l'art. 9 sous A) que sous B). On s'efforcera de respecter un certain équilibre dans la représentation des différentes associations et des différents départements. (2) (3)
(Le reste sans changement)

Article 11 - Le comité désigne parmi ses membres, un bureau comprenant : un président, un secrétaire et un trésorier, et éventuellement un ou deux vice-présidents, un secrétaire adjoint et un trésorier adjoint. Le bureau est renouvelable chaque année.

Le bureau est compétent pour prendre des décisions urgentes sur l'initiative du président. Ces décisions du bureau doivent être ratifiées par le comité.

Le Comité désigne parmi ses membres un bureau comprenant : un président, un secrétaire et un trésorier, et éventuellement un ou deux vice-présidents, un rédacteur, un secrétaire-adjoint et un trésorier-adjoint. Le bureau est renouvelable chaque année. Le Bureau est compétent pour prendre des décisions urgentes sur l'initiative du président. Ces décisions du Bureau doivent être ratifiées par l'ensemble du Comité pour autant qu'elles concernent la vie propre de la Fédération.

Lorsqu'elles se rapportent aux problèmes de l'Union Française pour l'Espéranto, conformément aux statuts de l'UFE, seuls les membres actifs de l'UFE seront appelés à donner leur avis. (3)

Article 12 - 2è alinéa : Pour les votes, tout membre à jour de sa cotisation dispose d'une voix et peut se faire représenter par un délégué dûment mandaté. Tout groupe ou centre culturel peut se faire représenter par un seul délégué qui dispose d'autant de voix qu'il y a, dans le groupe ou centre qui le mandate, de cotisants ...

qui ne votent pas individuellement. Aucun délégué ne peut toutefois détenir un nombre de mandats supérieur aux deux cinquièmes du total des membres de la fédération.

Pour les votes, tout membre à jour de sa cotisation dispose d'une voix et peut se faire représenter par un seul délégué qui dispose d'autant de voix qu'il y a, dans la société locale ou l'association spécialisée qui le mandate, de cotisants qui ne votent pas individuellement.

Aucun délégué ne peut toutefois détenir un nombre de mandats supérieur aux deux cinquièmes du total des membres de la Fédération.

Seuls les membres actifs de l'UFE ou leurs délégués peuvent voter pour les problèmes intéressant l'UFE. (3)

-
- (1) Cette formule est destinée à faciliter éventuellement l'obtention de subventions départementales.
 - (2) Petite modification calquée sur les statuts de 2 autres Fédérations régionales.
 - (3) Modification destinée : a)- à permettre le retour à la Fédération de membres démissionnaires.
b)- à permettre de transformer de simples abonnés en membres responsables ayant droit de vote sur le fonctionnement de la Fédération.
 - (4) Modification utile pour l'avenir du bulletin.